

Estanteco de Esperanto. Notoj el Sereto, enirejo de la esperantomovado en la Katalunan Landaron

Ĉi tiu urbo Sereto (Ceret) kie ni renkontiĝas hodiaŭ ludis gravan rolon en la disvolviĝo de Esperanto, ne nur en la Kataluna Landaro, sed ankaŭ tra la tuta mondo. La historio komenciĝas per tanslokiĝo de Aŭserano Paul Berthelot (1881-1910) al Sereto.¹ Anarĥiista homo, li esperantistiĝis en 1900 dum li studis en la Reimsa liceo. Tri jarojn poste li ekis loĝi en Sereto, kie li laboris kiel tipografo ĉe presejo Lamiot. Li vojaĝis tra Katalunio, Norde kaj Sude, kaj konatiĝis kun lokaj esperantistoj. En 1904 Émile Boirac, filozofo, rektoro de la Universitato de Grenoble, prelegis pri Esperanto en la urbodomo de Ceret. Li jam estis preleginto pri la sama fako en Perpinjano du jarojn antaŭe. La titolo de lia Sereta prelego estis «La neceso de internacia lingvo Esperanto». La saman jaron, 1904, fondiĝis organizo *Aplec Esperantista de Catalunya*, kie kuniĝis homoj el la nordo kaj el la sudo de la ŝtatlimo. Inter aliaj, aliĝis al la organizo Salvador Dalí, notario de Figuereso. Li mem verkis tri-paĝan artikolon pri Esperanto en la unua numero de gazeto *Espero de Katalunujo*, la unua bulteno de katalunaj esperantistoj. En ĝia tria numero aperis listo de katalunaj esperantistoj, kiu montras ke estis 22 esperantistoj en Perpinjano, 21 en Barcelono, 13 en Sereto, kaj 3 en Manreso. La 24an kaj 25an Aprilo 1905 organiziĝis la unua ĝenerala renkontiĝo de *Aplec Esperantista de Catalunya*, en Barcelono. En tute ĉeestis ĝin 10 nordkatalunoj. Unu el la decidaj prenitaj estas demandu al la D-ro. Zamenhof la kreon de radiko /katalan/ por nomi la

1. PUIG (2010) estas bona priskribo de la agado de Paul Berthelot en Sereto, kaj ankaŭ de lia biografio. Puig finas sian artikolon per peto de homaĝo de la urbo Sereto al ĝia enkondukanto en Esperanton. Dek unu jarojn post la centjariĝo de la fondado de *Aplec Esperantista de Catalunya*, la homaĝo ankoraŭ ne okazis.

loĝantojn de Katalunio. Tamen, la demando ne sukcesis, kompreneble, ĉar Esperanto ne permesas alomorfojn kaj /katalun/ jam ekzistis. Ili ankaŭ decidis pri la venonta renkontiĝo, kiun intencis loki en Banys d'Arles en 1906. Ĉi tiu renkontiĝo neniam okazis, ĉar *Aplec Esperantista de Catalunya* jam antaŭe malaperis ĉar en 1905 Frederic Pujulà i Vallès kreis *Espero Kataluna*, sude, kaj nordo kaj sudo disiĝis. Esperanto estis aperinta en Nord-Katalunio, precize en Sereto, kaj ankaŭ en Nord-Katalunio gravega afero okazis pri Esperanto: Berthelot ekprenis tie la du unuajn numerojn de revuo *Esperanto*, la unuan en Perpinjano, kaj la duan en Sereto mem. Post sia translokiĝo al Ĝenevo en 1906, Berthelot vendis la novan revuon al Hector Hodler. *Esperanto* neniam ĉesis publikiĝi, kaj ankoraŭ hodiaŭ estas la oficiala organo de UEA, la plej grava organizo pri Esperanto. Nuntempe la revuo estas legata en 115 landoj. Nord-Katalunio kaj konkrete Sereto fiereblas pri la eniro de Esperanto en Katalunan Landaron. Sed ĉar ne eblas fiero sen kono, taŭgos nun paroli pri kion signifas Esperanto hodiaŭ kaj ankaŭ pri la rilato inter esperantistoj kaj la normaligado de la Kataluna.

Certe, kiam oni aŭdas pri Esperanto unue pensas pri 19a jarcenta utopio ne plu celata dum niaj tagoj. Eblas ankaŭ pensi ke Esperanto kiel internacia lingvo malsukcesis kaj ke ne indas eĉ interesiĝi pri ĝi. Tamen, Esperanto estas fenomeno kun granda kvanto de sekvantoj tra la tuta mondo. Estas lingvo kiu permesas komunikadon, verkadon kaj iujn ajn aferojn kiujn kutime oni faras per etnalingvoj. Ne eblas klare precizigi la kvanton da esperantoparolantoj pro tio ke ne estas teritoria lingvo ie. Tamen, laŭ Ethnologue.com estas du milionoj da homoj kiuj havas Esperanton kiel L2. En kelkaj landoj la censo demandas pri lingvoregado, kiel en Hungario, Litovio, Novzelando kaj Rusio. Ekzemple, la hungara censo de 2011 trovis 8.397 parolantojn de Esperanto. Aliaj pli konservemaj priskriboj parolas pri cent mil. Pluraj miloj da denaskaj parolantoj ekzistas, laŭ Haarmann (2002), sed ili ĉiuj estas ne nur Esperanto parolantoj. Oni parolas pri ĉirkaŭ 1.000 familioj kun Esperanto kiel familia lingvo. Ekzemple, la hungara popolnombrado de 2001 montris ke la diferenco inter la tuta kvanto da parolantoj kaj ĉi tiuj kiuj havas Esperanton kiel L2 estis 168. Ŝajnas ke unulingvanoj kiuj parolas nur Esperanton ne ekzistas. En 1994 *The Encyclopedia of Languages and Linguistics* jam asertis ke ekzistas tria-generaciaj denaskuloj. Laŭ Jouko Lindstedt (1996) ekzistas:

- 1 000 denaskaj parolantoj, kaj
- 10 000 parolas flue, kvazaŭ denaske
- 100 000 povas uzi skribe kaj parole
- 1 000 000 akcepteble komprenas ĝin parolate kaj skribite
- 10 000 000 jam konatiĝis kun ĝiaj elementoj

Hodiaŭ ekzistas revuoj en Esperanto, radiaj elsendaĵoj, studprogramoj kaj en baz- kaj en mezlernejoj (127 entute). Esperanto estas instruata en 69 universitatoj de 22 landoj. Ekzistas en Universitato Adam Mickiewicz de Pollando postgrada

studprogramo pri Esperanto, instruita per ĉi tiu lingvo. Pri interreto uzado de la lingvo, elstaras ĝia loko en Vikipedio: estas la 32a lingvo laŭ kvanto da artikoloj. Kiel komparo, observu la sekvajn nombrojn:

TAULA 1
Lingvoj en Vikipedio

<i>Lingvo</i>	<i>Laŭ ordo</i>	<i>Artikoloj</i>	<i>Uzantoj</i>
Angla	1	4,979,360	26,360,960
Franca	5	1,668,257	2,336,610
Itala	9	1,226,733	1,272,681
Hispana	10	1,204,867	3,943,854
Kataluna	17	478,164	209,971
Esperanto	32	219,682	111,237
Dana	34	210,246	250,922
Eŭska	35	210,179	61,856
Bulgara	36	207,716	182,845
Slovaka	37	206,683	119,992

La paĝo «Esperanto» en Facebook havis la 4an Oktobro 2015 18.489 ŝatantojn, kaj laŭ Facebook, 310.000 el ĝiaj uzantoj deklaras ke ili parolas Esperanton (2.128.470 uzantoj de Facebook deklaras ke ili parolas la Katalunan).

La plej fama rimedo por lerni Esperanton nuntempe, *lernu.net*, havis la pasintan Majon (2015) pli ol 195.000 aliĝintojn.

Gravas ankaŭ revuoj. *Esperanto* havas pli ol 4.000 abonantojn, kaj *Monato*, *Heroldo de Esperanto*, *La Revuo Orienta* kaj *Esperanto aktuell* havas ĉiuj inter 1.000 kaj 1.700. Dum la lastaj jaroj la meza kvanto da eldonitaj libroj en Esperanto estas po 120 jare, el kiuj la duono estas beletraĵoj (20 originalaj + 40 tradukoj), kaj la ceteraj lernolibroj, raportoj, kaj alispecaj libroj.

Estas diversaj la radioj kiuj elsendas programojn en Esperanto: Pola Retradio, Radio Vatikana, Radio Havano Kubo aŭ Ĉina Radio Internacia estas la plej konataj.

La plej grava organizo pri Esperanto estas Universala Esperanto Asocio, kun 14.816 membroj en 2014 (adicio de individuaj membroj kaj aliĝitaj membroj). UEA estas konsulta partnero de UNESCO. Kaj en Montevideo en 1954 kaj en Sofio en 1985 la ĝenerala konferenco de UNESCO laŭdis la agadon de UEA kaj la bonecon de Esperanto por faciligi rilatojn inter popoloj.

193 renkontiĝoj estis anoncataj en www.eventoj.hu por 2015.² La plej grava estis la Universala Kongreso, jara kongreso organizata de UEA, kiu okazis en Lillo de la 25a Julio ĝis la 1a Aŭgusto, kaj kie partoprenis 2.068 kongresantoj el 80 landoj.

La strukturo kiu zorgas pri la lingvo formiĝas el la sekvaj institucioj: Akademio de Esperanto (ekde 1905) kaj Terminologia Esperanto-Centro (ekde 1987). «La Akademio de Esperanto estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon» (Artikolo 1 de Statuto de AE). Ankaŭ laŭ ĝia statuto, la taskoj de AE estas: «La Akademio esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton. Ĝi verkas vortaron de Esperanto kun difinoj en Esperanto. Ĝi verkas teknikajn terminarojn, aŭ kontrolas kaj aprobas tiajn terminarojn, verkitajn de aliaj aŭtoroj. Ĝi revizias aperintajn verkojn kaj kritikis ilin el lingva vidpunkto. Ĝi povas doni premiojn al la aŭtoroj de la plej bonaj aperintaj verkoj. La Akademio defendas Esperanton kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia» (Artikolo 2).

Ekde la vortaro enhavita en la Fundamento de Esperanto, fare de D-ro. Zamenhof, dek du modifojn suferis la oficiala vortaro. La lasta okazis en 2007. Entute, 2158 oficialaj ne fundamentaj radikoj estis aldonataj al la 2768 fundamentaj, do, sume, Esperanto havas 4953 aŭtoritate permesitajn radikojn. Kompreneble, ekzistas multe pli da vortoj. La Akademia vortaro konsistas preskaŭ tute el radikoj kaj finaĵoj, ne el vortoj. La Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (ne Akademia), en ĝia eldono de 2002, prezentas 46.890 leksikajn unuojn.

Indas diri ĉi tie ke en la vortaro enhavita en la *Fundamento de Esperanto* (1905) aperis tradukoj al kvin lingvoj: la Franca, la Angla, la Germana, la Rusa, kaj la Pola. Iuj el la sekvantaj aldonoj donis diversajn kombinojn de tradukoj en ĉi tiuj kvin lingvoj, sed ankaŭ en la Itala, la Hispana, la Portugala, kaj ankaŭ en la Kataluna, kaj en neniu alia lingvo. Do, historie kaj oficiale, la Akademio de Esperanto estas laborinta nur en naŭ nacilingvoj, unu el kiuj estas la Kataluna. Ĉi tio okazis en 1929, en la kvara oficiala aldono: 118 radikoj estis aldonitaj kun Kataluna traduko.

Ekzistas, do, en Esperanto, lingvaj rimedoj kiel oficiala vortaro, ofteca vortaro, inversa vortaro, multe da terminaroj kaj dulingvaj vortaroj, centra lingva aŭtoritato kaj teĥnika centro de terminologio. Ekzistas ankaŭ grandaj lingvaj korpusoj, kiel la *Tekstaro de Esperanto*.

Certe Esperanto estas la nura lingvo kiu komence artefarita progresis laŭ klara procezo de naturiĝo, ne nur ĉar ĝi iĝis unua lingvo de kelkaj centoj da denaskuloj, sed ĉar eĉ kiam oni parolas la lingvon kiel duan lingvon, videblas tra la Esperanto komunumo evidentaj de tio. Manaris kaj aliaj (2006) observis statistikajn uzadojn de vortoj en Esperanto kiu ne permesis distingi la lingvon de nacilingvoj, kaj Dols (2015) observis evidentajn de spontaneaj tendencoj de normiĝo. Hodiaŭ Esperanto ne plu

2. 4an Oktobro 2015.

estas (aŭ ne nur estas) lingvo kiun oni lernas por faciligi internacian komprenon, sed nur aŭ ankaŭ, lingvo kiu oni lernas ĉar ĝi permesas legi interesan propran literaturon aŭ pli simple konatiĝi kun aliaj esperantoparolantoj. En ĉi tiu senco, ne malsamas iun ajn lingvon, krom laŭ unu aspekto: Esperanto neniam estis altrudita ie.

La rilato inter la Kataluna Landaro kaj Esperanto certe komenciĝis en 1904 kun la fondado de *Aplec Esperantista de Catalunya* ĉi tie, en Sereto. Tamen, la rilato kreskis kaj iĝis pli kaj pli intima.

Eble unu el la plej elstaraj momentoj de la rilato estis la kongreso de Esperanto kiu okazis en Barcelono en 1909, ĵus post la tiel nomata Tragika Semajno. Estas konata fakto ke Francesc Ferrer i Guardia estis arestita kiam li intencis iri al la kongreso. Ĉiutage dum la kongreso, la ĵurnalo *La Publicidad* eldonis artikolojn en Esperanto. Zamenhof estis ricevita en Barcelona kvazaŭ ŝtatestro. La kongresanoj honoris la memoron de Bonaventura Carles Aribau per florofero al lia busto, kompreneble ne nur kiel rekomencanto de la kataluna literaturo sed ankaŭ kiel defendanto de la bezono de lingvo internacia en komento pri la proponoj de Sinibald de Mas.³ La postkongreso de 1909 okazis en Valencio.

Inter la katalunaj gravuloj kiuj kontaktis kun Esperanto estas Carles Riba, kiu sian unuan poezian premion ricevis en Internacia Floraj Ludoj de Barcelono 1909 pro poemo *Nu*, kiu krom la titolo estas ne konata ĉar ĝi perdiĝis. Ankaŭ Andreu Nin, Joan Amades kaj Joan Mascaró Fornés havis rilatojn kun Esperanto. Tamen, sendube, la plej gravaj Esperantistoj el katalundeveno estis

— Frederic Pujulà i Vallès (1877-1963), kiu estris la lokan kongresan komitaton de 1909, kaj verkis *Gramàtica rahonada de la llengua esperanto* (1906), kaj la unuajn vortarojn esperanto-katalunan (1908) kaj kataluna-esperanton (1909), kaj ankaŭ tradukojn kaj originalajn rakontojn kaj teatraĵojn en Esperanto.

— Delfi Dalmau i Gener (1891-1965), kiu estis akademiano de Esperanto kaj verkis pri pedagogio kaj lingvistiko. Gravus lia propono pri pasiva poliglotismo multe da jaroj antaŭ ol similaj strategioj estos lanĉataj el la aŭtoritatoj pri lingva normigado.⁴

En la kampo de beletraĵo elstaras la laboro de Jaume Grau Casas (1896-1950) ne nur kiel poeto en Esperanto, sed ankaŭ kiel ĉefredaktoro de *Kataluna Antologio*, ega tradukita antologio de kataluna tekstaro ekde Ramon Llull ĝis Tomàs Garcés per kio la tradukistoj publikigis la katalunan literaturon por internaciaj legantoj.

Nuntempe aliaj verkistoj el katalundeveno ankaŭ estas gravega en Esperanto literaturo, kiel Abel Montagut (n. 1953), kies epopeo *La poemo de Utnoa* estas profunde agnoskita, same kiel liaj tradukoj de *Amkantoj* de Ausiàs March. Ankaŭ

3. Legu CERDÀ SUBIRACHS & MARTÍNEZ-GIL (1996) pri la projekto de universala lingvo de Sinibald de Mas.

4. SOLÉ I CAMARDONS (2010).

gravas la prozaj beletraĵoj de Manuel de Seabra, kiel la romanoj *La tago kiam Jesuo perfidis Judason* aŭ *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?*, inter aliaj.

En lingvistiko, la verkoj de Hèctor Alòs i Font (1965) pri Esperanto, estas bone konataj, kiel la vortaroj Esperanto-Kataluna (kune kun Jordi Carbonell i Pinyol), kaj Kataluna-Esperanto.

Gravas scii ke la kataluna esperantistaro ĉiam baraktis por lingvaj rajtoj de ĉiuj popoloj, kaj ĉefe de la kataluna lingvo. Pri tio, mi citos eron de la Praga manifesto (2008) kiun Kataluna Esperanto Asocio apogis kaj kiu ankoraŭ hodiaŭ aperas en la paĝaro de la asocio kiel principaserto:

Ni asertas, ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

La katalunaj kongresoj de Esperanto okazas ekde 1910. Pravas ke la plejmulto el ili lokiĝis en Princlando Katalunio, sed ankaŭ iuj okazis kaj en Valencilando kaj en Majorko.

Kiel defendantoj de lingvaj rajtoj, la esperantistoj suferis persekuton de diktatoroj. En Majorko, same kiel en aliaj lokoj faŝisma premado okazis ekde la komenco de la milito, kaj estis murditaj Joan Matas Soler, Josep Salom Nadal, Antoni Coll Sastre kaj Sebastià Crespí Valls, kaj aliaj esperantistoj estis malliberigitaj.

Konklude,

1. La katalunaj esperantistoj ĉiam defendis lingvan egalecon, kaj pro tio defendis ankaŭ la katalunan en ĝia teritorio,
2. La katalunaj esperantistoj laboris por la diskono de la kataluna literaturo,
3. Esperanto estas hodiaŭ vivanta lingvo kiu spertas interesan procezon de naturiĝo,
4. Esperanto estas ankaŭ kultura posedaĵo de la Kataluna Landaro.
5. La rilato de la Kataluna Landaro kun Esperanto komenciĝis en Norda Katalunio kaj disvastiĝis al ĉiuj teritorioj.

La 31an Oktobro 2014, la pola registaro akceptis peton de ĝia Parlamento inkluzivigi Esperanton en la listo de polaj nemateriaj kulturaj heredaĵoj. Kompreneble, Esperanto ne apartenas nur al Pollando. Ĝi apartenas al la homaro, kaj pli precize, pro historiaj kialoj rilataj al la batalo por lingvaj rajtoj, apartenas ĝi ankaŭ al la kataluna kultura heredaĵaro. Mi petas al vi, diligenta kolegaro, penson pri tio, kaj eventuale agnoskantan agon.

NICOLAU DOLS
Institut d'Estudis Catalans
Universitat de les Illes Balears

BIBLIOGRAFIAJ REFERENCIOJ

- ABEYÀ, Bet (2010). «Joan Mascaró: inter Oriento kaj Okcidento». En: POBLET I FEIJOO, Francesc & HÈCTOR ALÒS I FONT. *Història de l'esperanto als Països Catalans: Recull d'articles = Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro: Artikolkolekto*. Sabadell: Associació Catalana d'Esperanto / Kataluna Esperanto-Asocio, p. 425-230.
- CERDÀ SUBIRACHS, Jordi & VÍCTOR MARTÍNEZ-GIL (1996). «L'utopisme lingüístic a la Catalunya de la Il·lustració i del primer Romanticisme». *Els Marges*, 55, p. 29-49.
- CORTIJO, Dani (2010). «Joan Amades kaj Esperanto». En: POBLET I FEIJOO, Francesc & HÈCTOR ALÒS I FONT. *Història de l'esperanto als Països Catalans: Recull d'articles = Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro: Artikolkolekto*. Sabadell: Associació Catalana d'Esperanto / Kataluna Esperanto-Asocio, p. 403-412.
- DALMAU, Delfí (1936). *Poliglòtisme passiu*. Barcelono: Publicacions de La Revista.
- DEVEDZIC, Vladan (2006). *IATED International Conference on Artificial Intelligence and Applications*. Innsbruck: IATED/ACTA Press.
- DOLS, Nicolau (2015). «Diversity, competence and standardisation in Esperanto: hints and questions» (presota). En: KOUTNY, Ilona & PIOTR NOWAK. *Język, Komunikacja, Informacja*. Poznan: Wydawnictwo Rys.
- HAARMANN, Harald (2002). *Sprachen-Almanach. Zahlen und Fakten zu allen Sprachen der Welt*. Frankfurt kaj Novjorko: Campus.
- KOUTNY, Ilona & PIOTR NOWAK (kunordigantoj) (2015). *Język, Komunikacja, Informacja*. Poznan: Wydawnictwo Rys.
- LINDSTED, Jouko (1996). «Uusi arvio esperanton puhujien määrästä» [«Nova pritakso de la nombro de esperantoparolantoj»]. *Esperantolehti*, 3, p. 7.
- MANARIS, Bill (2006). «Investigating Esperanto's statistical proportions relative to other languages using neural networks and Zipf's law». En: DEVEDZIC, Vladan. *IATED International Conference on Artificial Intelligence and Applications*. Innsbruck: IATED/ACTA Press, p. 102-108.
- MARGAIS, Xavier (2002). *El moviment esperantista a Mallorca (1898-1938)*. Palma: Documenta Balear.
- (2010). «La Esperanto-movado en Majoriko: plia viktimo de la frankisma subpremado». En: POBLET I FEIJOO, Francesc & HÈCTOR ALÒS I FONT. *Història de l'esperanto als Països Catalans: Recull d'articles = Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro: Artikolkolekto*. Sabadell: Associació Catalana d'Esperanto / Kataluna Esperanto-Asocio, p. 387-394.
- POBLET I FEIJOO, Francesc & HÈCTOR ALÒS I FONT (2010). *Història de l'esperanto als Països Catalans: Recull d'articles = Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro: Artikolkolekto*. Sabadell: Associació Catalana d'Esperanto / Kataluna Esperanto-Asocio.
- PUIG, Gentil (2010). «Paul Berthelot (1882-1910). Un jove esperantista i anarquista de pas per Ceret els anys 1903-1907». *Vallespir*, 6, p. 16-17.
- SIKOSK, Ziko Marcus (2003). *Eo sen mitoj*. 2a eldono. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- SOLÉ I CAMARDONS, Jordi (2010). «Delfí Dalmau: katalunismo, liberanismo kaj esperantismo». En: POBLET I FEIJOO, Francesc & HÈCTOR ALÒS I FONT. *Història de l'esperanto als Països Catalans: Recull d'articles = Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro: Artikolkolekto*. Sabadell: Associació Catalana d'Esperanto / Kataluna Esperanto-Asocio, p. 413-418.